



NEDERLANDA ESPERANTISTO

Orgaan v. d. Ned. Esperantisten-Vereniging „La Estonto Estas Nia”

— Onder redactie van het Hoofdbestuur —

Adres redactie en adm.: Mr. A. J. Kalma, Stadionkade 6 Amsterdam-Zuid.

EINDELIJK!

Zo is dan eindelijk met de verschijning van dit eerste naoorlogse nummer van „Nederlanda Esperantisto” een vurige wens van velen in vervulling gegaan! Onze driewekelijkse circulaire hebben het niet tot de dubbele cijfers kunnen brengen. Er is wel niemand, die dat zal betreuren, want ongetwijfeld is deze verandering een verbetering. Wel staan we nog even onwennig tegenover ons nieuwe orgaan, gewend als we waren aan de berichtjes in telegramstijl en de vaste indeling van onze circulaire.

We zullen ons nu weer moeten instellen op een meer normale berichtgeving, al zal het ook in de toekomst herhaaldelijk voorkomen, dat plaatsgebrek ons dwingt tot beknoptheid.

Konden we ons vóór de oorlog de luxe van een orgaan met 16 pagina's permitteren, de buitengewoon hoge drukkosten en papier-schaarste noodzaken ons, de omvang voorlopig tot 8 pagina's te beperken.

We hopen, dat deze verbetering voor onze nu reeds ruim 800 leden een aansporing moge zijn om hun uiterste krachten in te spannen.

Laten we het ijzer smeden, terwijl het heet is! Niet alleen voor de afdelingsbesturen, maar voor al onze leden is een taak weggelegd! De nieuwe leden, die zich na het beëindigen van de cursus in onze gelederen scharen, roepen wij een hartelijk welkom toe. Onvermoeid zullen wij samen verder strijden tot de eindoverwinning bereikt is.

La Estonto Estas Nia!

Jes, ĝi estas nepre vera —
Jen denove preslitera
N.E. kuŝas antaŭ vi!

Per tre granda la fervoro
Kaj post multe da laboro
L' estrar' nun sendas ĝin al vi.

Nia propra LEEN-organo,
La ligil' por ĉiu ano,
Tre bonvena estu ĝi!

H. V.

**UW PAASVACANTIE EEN SUCCES?
MELDT U AAN VOOR HET L. E. E. N.-CONGRES!**

J a r r a p o r t o j

Biblioteko.

Kiam en marto 1941-a la germanaj invadintoj malpermesis pluan agadon de L.E.E.N., mi sciis savi la bibliotekon. La plej valorajn verkojn, pri kiuj mi ankoraŭ disponis, mi kaŝis poparte ĉe amikoj kaj konatoj. Diversaj libroj estis pruntedonitaj kaj mi opiniis plej bone, lasi ilin provizore ĉe la pruntintoj. Post la 5-a de majo 1945-a mi okaze de la rekolektado bedaŭrinde spertis, ke pro la kaŝado kaj ofta transportado diversaj libroj mankas, nome numeroj 146, 341, 626, 627, 646, 685, 691, 911, 913 kaj 918. Poste evidentiĝis, ke en Enschedé perdiĝis pro la milito numeroj 1, 718, 729, 863, 883 kaj 896. Tre verŝajne en Bozum perdiĝis numeroj 479, 741, 862 kaj 921. De la numeroj 729 kaj 741 la biblioteko posedas duplikatojn. Domaĝe, ke inter ĉi tiuj libroj estas kelkaj valoraj, precipe por B-kandidatoj kaj ke kelkaj el ili ne plu estas aĉetebaj. Mi apelacias al ĉies kunlaboro, petante vin esplori vian libroŝrankon por kontroli, ĉu eble troviĝas en ĝi unu aŭ kelkaj el suprenomitaj verkoj (oni konsultu la katalogon). Cetere mi estos danka pro ĉiu donaco al la biblioteko.

Kvankam la ĝen. sekretario kelkfoje konsilis legi la librojn de la biblioteko, mi en 1945-a pruntedonis nur 66 verkojn. Oni superŝutu min per laboro, por ke la nombro da pruntitaj verkoj en 1946-a atingu rekordon!

Elspezoj:

Afranko skribaĵoj g. 0,44
Afranko pakedoj g. 2,84

Entute g. 3,28

Ĉar mi savis la kason (la saldo je la fino de 1941 estis g. 22,72), la saldo je la 31-a de dec. 1945 sumiĝis 19,44 g.

La Bibliotekisto,
E. A. KOOT

Teatra Servo.

Ĉiu sekcio rajtas prunti materialon el la provizo de nia teatra servo, pri kiu ĝi povas disponi maksimume unu monaton. La katalogo, kiun la sekciaj estraroj senpage ricevas, enhavas i.a. ± 100 teatraĵojn kaj skeĉojn, diversajn kantarojn kaj muzikaĵojn, enigmojn, taskojn, propagandbroŝurojn, k.t.p. Al ĉiu sekcoi ni sendis ekzempleron de „Waarom zou ik Esperanto leren?“, „Niaj Grupvesperoj“ kaj „Ludoj kaj Konkursoj“. En 1945 mi 18 fojojn sendis kolekton da teatraĵoj, k.t.p. al la sekcioj; krome al diversaj anoj mi laŭ ilia peto sendis propagandmaterialon, broŝurojn, k.t.p. La leteroj, kiujn mi ricevis de sekcioj, uzintaj la materialon, pruvas, ke oni ĝenerale tre ŝatas la laboron de la teatra servo.

Elspezoj:

Afranko g. 1,72
Aĉetita materialo g. 3,09
Diversaĵoj g. 0,66

Entute g. 5,47

Mr. A. J. KALMA

Propaganda Servo.

Tuj post la 5-a de majo la propaganda servo klopodis eklabori. Montriĝis tamen, ke regis tia haoso, ke mi ne sciis, kie kaj kiel komenci. Manko de papero estis la plej grava malhelpo.

En Amsterdam mi klopodis akiri kontakton kun la ekstera

mondo pere de anoncoj, sed ĉar la gazetoj, pro manko de papero, ne povis akcepti anoncojn, tio fiaskis. Laŭ inicato de f.-ino A. C. H. v. d. Beek ni aranĝis „Vredes-puzzle“, kiu sufiĉe bone sukcesis. Tamen la rezultato ne estis konforma al la farita peno. Ĉiusemajne mi faris propagandan prelegon pri Esperanto antaŭ la Kanaĉanoj. La interesiĝo estis kontentiga; kelkaj mendis skriban kurson ĉe la Brita Esperanto-Asocio. Kun diversaj konsilantoj kaj aktivuloj mi poste skribe interkontaktis, i.a. kun s.-ro Luinge el Groningen kaj s.-ro Dijselynck el Terneuzen. Por plifortigi la propagandan kason ni kune kun cirkulero 8-a forsendis ĝirpagilon al ĉiuj niaj anoj. La rezultato estis kontentiga. Entute ni ricevis ĝis nun 202,15 g. Al ĉiuj donacintoj ni sendis dankskribon. Antaŭ kelkaj tagoj mi dissendis demandaron pri la stacidomŝildoj. Planoj aŭ sugestoj rilate propagandon ĝis nun ne atingis min.

H. BAKKER

VERSLAG 1945

ALGEM. NEDERL. ESPERANTO-EXAMEN-COMMISSIE

Voorzitter van de examencommissie was de heer H. Velthove.

Vice-voorzitter: Mr. A. J. Kalma.

Secr.-Penningmeester: H. M. Mulder.

Commissie-leden: de heren G. J. Degenkamp, J. van Scheepen, W. F. Kruit, F. Faulhaber, A. Pascha, F. Weeke, E. Koot.

Examinatoren voor F.L.E.: Mevr. H. Oudenhoven-Bishoff en de heren G. P. de Bruin, R. Israëls, C. J. Coppens, H. F. W. Nieweg, J. W. Prent, B. Wels. Voor L.E.E.N.: de dames S. H. J. Blok, J. W. Woutersen, G. H. Benink en de heren C. Govers, H. Bakker, P. Korte en R. J. Kuiper.

Reeds tijdens de oorlog, vooral gedurende de laatste maanden wachtte de Esperanto-Examen-Commissie 't ogenblik af, waarop haar werkzaamheid zou kunnen worden hervat. De commissie was van mening, dat hetzelfde

ongeduld de ware Esperantisten zou beheersen, en wij durfden veronderstellen, dat velen hun studie tijdens de oorlog hadden voortgezet.

Daarom besloten wij reeds in 1945 twee examens te organiseren: 21 Oct. in Amsterdam en 27 Oct. in Den Haag, in de hoop, dat een behoorlijk aantal kandidaten zich zou aanmelden.

En het resultaat was werkelijk bevredigend. Voor het examen te Amsterdam meldden zich aan: 3 B- en 23 A-candidaten. Opgekomen: 3 B- en 20 A-candidaten. Geslaagd: 3 B- en 13 A-candidaten.

Voor het examen te Den Haag meldden zich aan: 3 B- en 6 A-candidaten. Opgekomen: 2 B- en 5 A-candidaten. Geslaagd: 1 B- en 5 A-candidaten.

Onze commissie bezat natuurlijk absoluut geen geld en was enigszins bezorgd over de financiële zijde der zaken. Maar ook dat kwam in orde.

In Amsterdam kregen we de examen-zaal kosteloos en in Den Haag zeer goedkoop.

Drukkosten hadden we in het geheel niet, want de heer Kalma verzorgde kosteloos alle examentaken, puntenlijsten, enz.

Zo komt het, dat, ofschoon noch F. L. E., noch L.E.E.N. enig voorschot gaven over het jaar 1945, onze kas toch sluit met een aardig saldo.

KASSTAAT — JAAROVERZICHT.

Amsterdam: Examengelden	f 84.—	
Onkosten	f 15.50	
Den Haag: Examengelden	f 25.—	
Onkosten	f 18.94 1/2	
		f 68.50
Drukkosten		f 2.—
Postzegels en telefoon		f 12.17 1/2
Diverse onkosten		f 1.29
Saldo 1945: Kas		f 57.14
Postzegels		f 2.04
		f 74.55 1/2
		f 74.55 1/2

De secr.-penningmeesteresse:

H. M. Mulder,

ENIGMOJ

1. Mia tutaĵo estas bona konsilo (proverbo) kaj konsistas el 27 literoj: 23—8—15—2—7—26 estas birdo, 20—6—3—12 estas pluvbano, 10—25—14—13—26 estas besto kun longaj oreloj, 19—21—9—4 estas korpoparto, 27—18—5—12 estas parenco kaj 16—17—14—1—14—11—24 signifas: perdinta la prudenton pro mensa malsano.

2. Faru el jenaj silaboj: a — al — bu — fe — fo — go — in — ko — la — le — no — o — o — o — pi — ro sep kvarliterajn vortojn kun jenaj signifoj: 1 metalo, 2 avenuo, 3 besto, 4 kolora fluidaĵo, 5 narkotiko, 6 vasta etendaĵo da akvo, 7 arbo. La unuaj literoj, legataj de supre malsupren faras la titolon de historia romano, tradukita en Esperanton.

3. La jenaj vortoj konsistigas menaĝerion. Serĉu ĉiujn kaŝitajn bestojn: arde, ordo, golfo, kolo, okaze, brodi, oka, pro, dolĉe, valo, tezo, konstato, kalko, torturo, strabe, loko, agado, danci, modo.

Solvoj atingu la red. plej malfrue lundon 11-an de marto. Inter tiuj, kiuj bone solvis la 3 enigmojn ni lotumos kelkajn libro-premiojn.

LA EKZAMENOJ EN 1946

Ekzistas nun nur unu ekzamena komitato, konsistanta el po 3 anoj de L.E.E.N., F.L.E., N.K. kaj N.C.E.V.

La estraro konsistas el F. Faulhaber, prezidanto; P. Heilker kaj H. A. de Hoog, vic-prezidantoj kaj. f.-ino H. M. Mulder, sekr.-kasistino.

Por atingi la longe sopiratan unuecon FLE kaj LEEN rezignis pri ekzamenado je dimanĉo. Kompense la komitato aranĝos 3 ekzamenojn je ĉielirtago 30-an de majo, nome en Amsterdam, Leeuwarden kaj Rotterdam, dum ke la aliaj ekzamenoj okazos nur sabate, nome 11-an de majo en Den Haag, 22-an de junio en Eindhoven, 13-an de julio en Deventer, 5-an de oktobro en Heerlen kaj 26-an de oktobro en Utrecht.

La kostoj estas por ekzameno A 7,50 guld. kaj por ekzameno B 12,50 guld. Por anoj de unu el la organizantaj asocioj kaj de NoSoBE la kostoj estas respektive 4 guld. kaj 6,50 guld.

Oni anoncu sin 6 semajnojn antaŭ la ekzameno.

Detalajn informojn donas la prospekto baldaŭ aperonta kaj senpage akirebla ĉe la organizantaj asocioj.

Por la Ĝenerala Nederlanda Esperanto-Ekzamena Komitato.

H. M. MULDER

Zilvermewstr. 29, Badhoevedorp
sekr.-kasistino.

INTERNACIA ESPERANTO-LIGO

Kore mi dankas tiujn, kiuj jam faris sian devon kaj sian kotizon por la nuna jaro. Al la aliaj individuaj membroj de I.E.L. mi afable petas pagi la ŝuldatan kotizon kiom eble plej baldaŭ, por ke ili regule ricevu la monatan gazeton „Esperanto Internacia”. Por la novaj anoj mi komunikas, ke la membreco de I.E.L. kostas g. 2,25 (kun jarlibro), g. 4,75 (kun jarlibro kaj „Esperanto Internacia”) kaj g. 10,75 (membro-subtenanto). La nura abono je la gazeto kostas g. 3,50. Oni pagu prefere per poŝtkonto 79167.

A. PASCHA,
ĉefdelegito I.E.L.

KOMUNIKOJ DE LA ĈEFESTRARO

Nova Sekcio. Laŭ sciigo de nia konsilanto s.-ro G. Dijselynck restariĝis nia iama sekcio en Terneuzen. Ni esperas, ke ĝi bone fartos kaj fariĝos nova centro de agado en la provinco Zeeland.

Sekciaj Jarraportoj. Kun ĝojo ni sciigas, ke preskaŭ ĉiuj sekciaj sekretarioj ĉi-jare ĝustatempe

sendis la jarraportojn kaj membrolistojn. Ni kore dankas la sekretariojn pro ilia kunlaboro! La feliĉe nur malmultaj funkciuloj, kiuj ankoraŭ ne faris sian devon, bonvolu kiom eble plej baldaŭ fari ĝin.

Kandidatigo ĉefestraro. Sekcioj Amsterdam kaj Utrecht kandidatigas kiel ĝen. kassistinon de L.E.E.N. f-inon H. M. Mulder el Badhoevedorp (Amsterdam); kiel ĉefestraron sekcio Amsterdam kandidatigas s.-ron F. Weeke.

Proksimaj numeroj. La 2-a numero de „Nederlanda Esperantisto” aperos proksimume 23-an de marto; la 3-a numero proksimume 16-an de aprilo, do kelkajn tagojn antaŭ la kongreso. La postaj numeroj aperos se eble regule ĉiam meze de ĉiu monato. Presotaĵoj por la 2-a numero atingu la redaktoron plej malfrue la 13-an de marto.

Statuto, regularo kaj katalogo. Provizore ne eblas represigi niajn statuton kaj regularon. Ni feliĉe disponas pri kvanteto el la jaro 1935-a, kaj intencas pretigi specialan folion, menciante ĉiujn postajn ŝanĝojn, kiun ni kun ekzemplero de la malnova regularo sendos laŭpete al ĉiuj sekciaj estraroj, konsilantoj, funkciuloj kaj ĝeneralaj anoj. Oni bonvolu atenti, ke en la aldonita katalogo la numeroj de la libroj ne plu estas ĝustaj. Pruntepetante verkojn, oni do ne nur sciigu al la bibliotekisto la numerojn sed ankaŭ la nomojn de la aŭtoroj kaj titolojn de la dezirataj verkoj.

Sekciajn gazetojn kaj kunvokilojn oni sendu ne nur al la anoj de la sekcio, sed ankaŭ al la provinca konsilanto kaj ĝen. sekretario. Estas necese, ke tiuj funkciuloj estu bone informataj pri la agado de la sekcioj.

Nederlands Esperanto-Centrum. Ĉi tiu „centro” fakte ne estas centro kaj neniel reprezentas ian Esperantan asocion aŭ komitaton, sed estas pure privata entrepreno de esperantisto en Rotterdam.

BUDĜETO 1946

Enspezoj:

Kotizoj	g.	2700,—
Donacoj	„	50,—
Diversaĵoj	„	50,—
Profito Libro-Servo	„	200,—
Rezervo	„	500,—
	<u>g.</u>	<u>3500,—</u>

Enspezoj:

Organo kaj redaktoro	g.	1200,—
Biblioteko	„	40,—
Els. adm. estraro	„	250,—
Kunvenoj ĉefestraro	„	200,—
Els. ĉefestraranoj	„	150,—
Konsilantoj	„	100,—
Delegitoj jarkunveno	„	162,—
Salono jarkunveno	„	40,—
Kotizo I.E.L.	„	200,—
Ekzamena Komitato	„	25,—
Esp. ĉe la Instruado	„	10,—
Teatra Servo	„	10,—
Radio-Servo	„	10,—
Kotizo N.C.K.E.	„	80,—
Propagando	„	923,—
Diversaĵoj	„	100,—
	<u>g.</u>	<u>3500,—</u>

NOVAJ ELDONOJ

„*D-ro Dorner*”, originale verkita en Esperanto de H. J. Egerup. Eldono: Dansk Esperanto Forlag, prezo 6,50 d. kr.

„*La Forto de l'Vero*”, facila romaneto por komencantoj, originale verkita en Esperanto de Adi. Eldono: Dansk Esperanto Forlag, prezo 2,50 d. kr.

Provizore mankas loko por enpresigi recenzon pri suprenomitaj verkoj.

WEET U...

dat Mevr. Roosevelt heeft verklaard, dat zij aan de Verenigde Naties voor zal stellen een wereldtaal in te voeren, die elk kind, waar ook ter wereld, naast de taal van zijn eigen land als tweede taal zal moeten leren?

dat door de Zuidamerikaanse republiek Ecuador bij de U.N.O. een voorstel werd ingediend, om het systeem der koptelefoons, dat te Neurenberg in gebruik is, ook bij de zittingen van de U.N.O. te gebruiken, maar dat dit voorstel werd verworpen, aangezien door technici werd uitgerekend, dat de toepassing van een dergelijk systeem een jaarlijkse uitgave zou vergen van 5 miljoen dollar en er twee jaren nodig zouden zijn om de technische uitrusting te verzorgen en de nodige tolken te vinden...?

dat het blad van de Kon. Ned. Schaakbond onder „Internationaal Contact” o.a. schrijft, dat de heer Dr. V. Faihgl (Tsjecho-Slowakije) is aangesteld om een speciale Esperanto-afdeling te beheren in de internationale landenwedstrijden?

dat de heer A. Veen, voorzitter van N.C.K.E., Zaterdag 9 Febr. voor de V.A.R.A. sprak over het onderwerp „Esperanto in dienst van de vredesgedachte”?

dat kort voor de oorlog in Engeland is opgericht het „Gilde van den Heiligen Ajdan” (adres: Roy England, The Rectory, Chilton Cantelo, Yeovil, Somerset, Engeland), dat zich ten doel stelt gelden voor de missie bijeen te brengen door het vervaardigen en tentoonstellen van miniatuur-reproducties van architectonische schoonheden en dat dit gilde Esperanto gebruikt om zijn doel internationaal te propageren?

dat de Internationale Vereniging van Postzegelverzamelaars (adres XPDO-House, Didcot, Berks. Engeland) correspondeert in Engels en Esperanto en een orgaan uitgeeft, dat in bovengenoemde beide talen is geredigeerd?

dat het urgentie-program van de Radicaal Democratische Volkspartij (R.D.V.P.) o.a. vermeldt invoering van de wereldhulptaal Esperanto als verplicht leervak op de openbare en bijzondere scholen?

dat als les No. 39 van de cursus Algemene Ontwikkeling, verzorgd door de I.V.I.O. (adres Westeinde 13, Amsterdam-C.) verschenen is de brochure „Welke wereldtaal?”, een debat tussen Dr. G. Bolkenstein (pro Engels) en Dr. W. J. Nijveld, voorzitter van onze Amsterdamse afdeling (pro Esperanto)?

dat een nieuwe afdeling is opgericht in Boskoop?

OPROEP AAN DE NED. ESPERANTISTEN

Tegelijk met dit nummer verzenden we aan al onze leden een exemplaar van de oproep, door het Centraal Comité van de Esperanto-beweging in Nederland gericht aan de Nederlandse esperantisten.

Wij verzoeken onze leden hun exemplaar na lezing aan een niet aangesloten esperantist te zenden, of het aan hun afdelingssecretaris te geven, die de ontvangen exemplaren als propaganda-materiaal gebruiken kan, om ze na ze event. voorzien te hebben van een stempel met verenigingsadres, waar de geadresseerde nadere inlichtingen kan vragen, aan niet georganiseerde esperantisten te sturen. Meerdere exemplaren zijn gratis bij den alg. secr. verkrijgbaar.

XIII-a NED. ESPERANTO-KONGRESO AMSTERDAM.

La diligentaj membroj en Amsterdam (kial ne ĉiuj?) plenvapore laboras por dece akcepti la kongresanojn. Vi helpu per multopa kaj baldaŭa aliĝo! Tiuj, kiuj aliĝos antaŭ 1-a de marto pagos rabatitan kotizon (2,25 g.). Aliĝilojn kaj monon oni sendu (prefere poŝtmandate) al la sekretario de la L.K.K. s-ro H. Veenstra, *Achillesstraat 107, Amsterdam-Zuid.*

Por tiuj, kiuj anoncos sin lastmomente, la L.K.K. ne povos prizorgi tranoktadon en hotelo. Detalojn pri la kongresprogramo kaj kotizo havigas al vi la speciala kongrescirkulero, dissendita kune kun cirkulero 9-a al ĉiuj niaj anoj.

Unua listo de aliĝintoj (ĝis 18a de februaro):

Amsterdam: s-ro P. W. Baas, s-ino L. Baas—Kroef, s-ro H. Bakker, s-ino W. A. Bakker—Smith, s-ino F. W. Beukman—Kemp, f-ino S. H. J. Blok, f-ino A. H. Bosscher, s-ino C. Bijmolt—Ochtman, f-ino H. W. A. v. Campen, f-ino N. L. Daams, s-ro H. S. Donker, s-ino A. D. W. Donker—Hemme, f-ino D. M. Donker, s-ro M. v. d. Haterd, s-ro W. Holzhaus, s-ino Holzhaus, s-ino M. C. v. Immerzeel—Nijman, s-ro A. J. Kalma, s-ro L. J. Th. Kamman, s-ro F. Mannheimer, s-ino B. E. A. Mannheimer—Weisel, s-ino S. Michels—Wiersma, s-ino M. E. Schmidt, s-ino N. Stadt—Stapel, s-ro J. Tellekamp, f-ino A. M. v. Thiel, f-ino J. J. v. Thiel, s-ino J. Tromper, s-ro H. Veenstra (harhava), s-ro H. Veenstra (kalva), s-ino M. L. Zwart—v. d. Harst, *Arnhem:* s-ino A. M. v. d. Wal—Brethouwer, *Badhoevedorp:* f-ino H. M. Mulder, *Bergen:* s-ro A. Pascha, *Deventer:* s-ro C. B. Zonderwan, s-ino E. H. Zonderwan—Visser, *Enschede:* s-ro R. J. Kuiper, *Groningen:* s-ro G. Luinge, *Den Haag:* f-ino C. Franken, f-ino J. B. Lehnen, s-ro D. Lehnen, s-ino S. A. Lehnen—Westerhuis, s-ro M. E. Nawijn, s-ino E. Nawijn—Woutman, s-ino J. M. Ravestein—Basters, s-ro F. Weeke, *Haarlem:* s-ro W. ter Braake, *Heerenveen:* s-ro A. J. Nijdam, *Hilversum:* s-ro C. B. v. Ees, s-ro J. M. Hansen, s-ino Hansen, f-ino A. Hellinx, s-ino C. H. Horning—Regter, f-ino M. König, f-ino A. Middelkoop, f-ino E. Steinmeyer, s-ro C. Pot-huyzen, s-ro A. Put, s-ino R. v. Veen, f-ino S. Visser, *Leeuwar-*

den: s-ro W. Böttcher, s-ino L. Böttcher—Reitsma, *Leiden:* s-ro P. Hoop, *Purmerend:* s-ro G. D. Lankelma, s-ino G. C. Lankelma—Kat, *Scheveningen:* s-ro T. Jung, *Soest:* s-ino C. M. E. den Hollander—Mighorst, s-ro A. de Vries, *Steeg:* s-ro G. Bekkering, *Veendam:* s-ro P. Korte, *Voorburg:* s-ro S. Roelofsen.

Entute: 71.

MORTOJ

BENSON. — Je 20 okt. 1945 mortis D-ro Wm. S. Benson, Irvington, N. J., Usono. D-ro Benson estis la aŭtoro de la monumenta verko „Universala Esperanto-Metodo. „E. J.”

KONKURSO

La gvidanto elektas vorton (prefere 8-literan), en kiu ne dufoje estas sama litero, ekz. „veturilo”. La ludantoj metu la literojn de tiu vorto unu sub la alian kaj provu dum 15—20 minutoj fabriki novajn kiom eble plej longajn vortojn respektive komenciĝantajn per la literoj de la elektita vorto kaj konsistantajn nur el literoj de tiu vorto. Ankaŭ en tia vorto ne estu dufoje sama litero kaj la unua fabrikota vorto ne estu la elektita vorto mem. Post la difinita tempo ĉiu transdonas sian taskon al la dekstra najbaro, kiu aljuĝas poentojn laŭ jena sistemo:

v irtulo	7	Ĉiu litero de la 1-a vorto valoras 1 poenton; ĉiu litero de la 2-a vorto uzita jam en la 1-a vorto 2 poentojn. Literoj de la 2-a vorto ne jam uzitaj en la unua vorto valoras 1 poenton. Ĉiu litero de la 3-a vorto uzita jam en la 1-a kaj 2-a vortoj valoras 3 poentojn, ĉiu litero de la 3-a vorto uzita jam en la 1-a aŭ 2-a vorto 2 poentojn kaj ĉiu ne antaŭe uzita litero 1 poenton, k.t.p. Vorto, en kiu estas dufoje sama litero valoras neniom. Tiu, kiu akiris la plej multajn poentojn estas la gajninto.
e ltrovi	13	
t. oleri	17	
u tilo	18	
r evulo	23	
i leto	26	
l ivero	34	
o lei	29	
	167	

MAKSIM GORKI PRI ESPERANTO

La granda revolucia verkisto, Maksim Gorki, estis granda amiko de Esperanto. Pro lia progresemo, veremo kaj artoplana verkado li estas tregea amata inter la bulgara laboristaro kaj speciale inter la bulgara esperantistaro. La Esperanto-societoj en Sofia kaj Svilengrad portas lian nomon.

Li havis plurajn favorajn eldirojn pri nia lingvo. En unu el siaj leteroj li i. a. diras:

„La argumento kontraŭ Esperanto estas, ke ĝi estas artefarita lingvo, kaj lingvojn oni arte ne kreas. Mi ne scias, kiel estis kreitaj la lingvoj tiam, kiam la homo la unuan fojon sentis la bezonon paroli: la teorioj pri la deveno de la parolo ŝajnas al mi nesufiĉe klarigantaj tiun ĉi proceson. Sed al mi ŝajnas, ke ni homoj rajtas diri: ĉio, kion ni nomas „Kulturo”, estas kreita de nia scienco, tekniko, arto, parolo — tio nome, kio nin apartigas de la bestoj — ĉio ĉi estas artefarita. La teokulereto estas objekto artefarita, tiel kiel artefaritaj estas la tranĉilo, la botoj, la veturilo, la boato, la aŭto, la vaporŝipo, la libro, la muziko, la bildo.

Por la homo — kiel ankaŭ por la besto — estas nature iri nude, muĝi kiel besto; sed estas tute nenature elpensi Prometeon, Faŭston, Donkihoton.

Ni loĝas en domoj, urboj, inter objektoj faritaj per forto de nia racio kaj imago, per la forto de nia volo. por ke nia vivo estu pli facila kaj agrabla. Ĉio sur la tero estas kreata per streĉo de nia volo, nia racio kaj nia imagokapablo”.

El „Internacia Kulturo” (Sofia). Numero de oktobro 1945.

De boekendienst van L. E. E. N. levert U:

Privat: Vivo de Zamenhof (gecart.)	f 1.65
Puŝkin: La Kapitanfilino	f 1.20
Babits: La Cikonikalifo	f 1.20
Orzesko: Bona Sinjorino	f 0.25
Mérimée: Mateo Falcone	f 0.35
Korolenko: Sonĝo de Makaro	f 0.35
Karinthy: Norda Vento	f 0.70
Sienkiewicz: Noveloj	f 0.75
Payson: Juneco kaj Amo	f 0.35
Orzesko: Interrompita Kanto	f 0.50
Sierozewski: Fundo de l' Mizero	f 0.55
Kilian: La mondo al ni!	f 0.75
Zweig: Okuloj de la eterna frato	f 0.90

Gemakkelijke lectuur voor beginners:

Privat: Karlo	f 0.40
Bulthuis: Malriĉa en Spirito	f 0.30
Borel: Legolibreto	f 0.25
Kabe: Unua Legolibro	f 0.90

Bestellingen aan: M. v. d. Haterd, Smitstraat 40 hs., Amsterdam-O.

